


MONATA ORGANO DE OOMOTO KAJ U.H.A.

# Oomoto

1  
9  
6  
7

Nov-Dec.

29-a Jaro N-ro 329-330 Administracio: Oomoto, KAMEOKA, Kioto-hu, Japanujo



*La tombo de Klara Zamenhof (1863-1924), en Varsovio, fotita de Hideo Haga*

# Ebleco de Pacifika Kongreso Diskutata

Kiel menciite en la raporto pri la 54-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj (vd la lastan numeron), okazis en la kongresa laborkunsido arda diskuto rilate la proponon : okazigi *Pacifikan Kongreson de Esperantistoj*, kiun prezentis Esperanto-Propaganda Asocio (EPA, specialigita organizo de Oomoto por Esperanto-movado). Ĉar la afero grave rilatas al la tutmonda esperantistaro, ni ĉi-sube prezentos resumon de la diskutado kaj invitas la legantojn prezenti al ni siajn opiniojn pri tio.

Unue, ni resumas la esencajn punktojn de la propono.

\*

## **Propono de EPA : Okazigo de Pacifika Kongreso de Esperantistoj**

Ni prezentas la proponon, ke ni organizu Pacifikan Kongreson de Esperantistoj kaj komencu la preparlaborojn por tio laŭ jenaj linioj.

- 1) Tempo : somere de 1970
- 2) Loko : Kioto (aŭ iu alia urbo de Kansai)
- 3) Partopreno : individua kaj kolektiva de esperantistoj el la landoj situantaj laŭlonge de Pacifika Oceano.
- 4) Prepara Komitato : fondi en Japanujo Preparan Komitaton por alvoki la esperantistojn en la koncernaj landoj. Poste la Komitato estos pligrandigita. Loka Kongresa Komitato estos organizita de japanaj esperantistoj.

Motivigo : La Esperanto-movado, kiu devas esti universala, estas efektive gvidata laŭ la Eŭrop-centrigaj labormetodoj. Mankas la klopodoj kaj rimedoj por fortigi la solidarecon kaj kunlaboron de l' esperantistoj en la ekster-eŭropaj landoj. Necesas fari elpaŝon el tia stato.

Ankaŭ la Universala Kongreso okazas, escepte de nur tri okazoj, en Eŭropaj urboj, kaj kiam U.K. okazis en ekster-eŭropaj urboj, senhezite

organiziĝis Eŭropaj Konferenco kaj Kongreso.

En la lastaj jaroj, la movado en Japanujo rimarkinde progresas; ankaŭ en Usono, Aŭstralio, Nov-Zelando, ktp. ni vidas la antaŭenpaŝon de nia movado; kaj ni ne devas preteratenti la seriozan laboron en Aziaj landoj, precipe en Sudorienta Azio. Nepre necesos plifortigi nian solidarecon en tiuj regionoj per organizado de renkontiĝoj en ekster-eŭropaj landoj, ĉar ankoraŭ estas malfacile por ili ofte veturi al Eŭropaj landoj por U.K. Tiuj renkontiĝoj manifestacios al la ekstera mondo pri la solvo de la problemoj kaŭzataj de la lingvo-diverseco.

\*

Dum la diskutado klare montriĝis du ekstremaj opinioj, nome, por kaj kontraŭ. La *kontraŭ*-opinioj resumiĝas kiel jene:

Unue, la proponita tempo de la Pacifika Kongreso estas ĝuste la jaro, kiam Usona-Japana Sekurec-Pakto atingos la limtempon por revizio, aŭ pli-ĝuste, por plu-daŭrigo, kio per si mem kaŭzos gravan politikan movon, eĉ portempan haoson, kaj pro kio antaŭvideblas ke ŝtormo da diversaj manifestacioj de l' publiko por malhelpi tion trablovos la landon. Oni sentas ankaŭ, ke eventuale ĉiam pli grandiĝos internacia streĉo kaŭze de militoj kaj konfliktoj kiel okazas nun en Vjetnamio; sub tiaj cirkonstancoj ne estos oportune havi tian Kongreson en Azio. Krom tio, oni povas suspekti, kiel efektive okazis kaj okazas, ke la Japana Registaro ne volonte donos enirvizon al tiuj kiuj venos de socialismaj landoj; kaj la Kongreson povos ĉeesti esperantistoj nur el malmultaj landoj. Tiam la renkontiĝo ne povos meriti la nomon Pacifika, sed ĝi estos nura festaĵo.

Favoraj opinioj, aliflanke, montras pozitivan sintenon rilate la okazigon de la Kongreso. Ili substrekas, ke ni havu tian renkontiĝon, ne submetante nin nur al tiaj ŝanĝiĝemaj politikaj aferoj, sed pli gravigante la signifon de la kunveno, en kiu kolektiĝos esperantistoj el diversaj landoj por profundigi la reciprokajn amikecon kaj kune preparoli la aferojn koncernantajn al niaj porpaj laboroj. La jaro proponita konvenas, ĉar tiam ankaŭ la Monda Ekspozicio '70 havos lokon en Osaka, proksima al la proponata kongresurbo. En ĉiu okazo Pacifika Kongreso faros la unuan paŝon por plifortigi la solidarecon de la ekster-eŭropaj esperantistoj.

Leviĝis intertempe kompromisa opinio, ke ni jam komencu laboron por

# Japanana esp-isto s-ro Jui sin brulmortigis por admoni la ĉefministron

La tutan Japanujon en la vespero de 11. novembro, 1967, ŝokis la novaĵo pri s-ro Ĉunoŝin Jui, fervora esperantisto en Jokohama, kiu per flamoj de benzino bruligis sin sur la strato antaŭ la oficiala domo de Japania Ĉefministro Eisaku Sato, en Tokio. Tio okazis unu tagon antaŭ la forveturo de s-ro Sato al Vaŝingtono por negoco. En sia letero skribita en deca formo kaj adresita al la ĉefministro, s-ro Jui protestis: 1) ke la bilo reguligi la kapitalon por politika agado estis abortigita; 2) ke la vizito de s-ro Sato al Usono estas vana, se li iras kun la scio, ke la Usona Registaro rifuzos redoni al

Japanujo la insulojn Okinaŭa kaj Ogasaŭara; 3) la ĉefministro subtenas la Usonan bombadon sur Nord-Vjetnamion, anstataŭ doni influon por haltigi la malhumanan bombadon.

Kiam s-ro Jui sin bruligis per benzin-fajro ĉirkaŭ 5 : 50 pm. de la tago, kelkaj preterpasantoj kaj du policianoj alkuris kaj rapide estingis la flamojn kaj transportis la jam severe brulvunditan korpon de s-ro Jui al proksima hospitalo. La sekvintan matenon la kuracistoj trovis lian temperaturon iom malaltiginta, sed je 2 : 50 pm. lia spirado malreguliĝis kaj li falis en komaton;


---

okazigi la Kongreson, farante klopodojn por ke la Japania Registaro donu enirvizon al ĉiuj partoprenontoj el socialismaj landoj, kaj zorge preparante la programojn de la Kongreso konformajn al la celo.

Tiel daŭris la diskutado pli ol unu horon kaj duonon; oni ne povis atingi konkludon. Fine, la kunsido komisiis la studon pri la afero al tri organizaĵoj: Japania Esperanto-Instituto (JEI), Esperanto-Propaganda Asocio (EPA) kaj Kansai-Ligo de Esperanto-Grupoj (KLEG).

La 12-an de aŭgusto, kunvenis reprezentantoj de la nomitaj tri organizaĵoj en Osaka kaj daŭrigis la diskuton. Sekve de tio, la Studkomisiono publikigis sian konkludon rilate la temon kiel jene:

“Ni agnoskas tre granda la signifon okazigi Pacifikan Kongreson en



(1894 — 1967)  
*Pacon al nia karmemora  
sinjoro Ĉ. Jui!*

baldaŭ ĉia rimedo montriĝis vana. En tiu horo, kiel planite, s-ro Sato, ĉefministro, forflugis de Tokio al

Usono. . .

Tia drasta ago de protesto per sinbrulmortigo okazis por la unua fojo en Japanujo. En la gazetaro aperis diversaj opinioj. Kelkaj eĉ kritikis s-ron Jui kontraŭ la ago mem, ĉar la homa vivo estas supera al ĉio ; sed multaj pensuloj kaj intelektuloj de la lando estis tuŝitaj de lia ago, ĉefe pro la fakto, ke li estis sincera homo kiel esperantisto kaj pacifisto en sia ĉiutaga vivo.

La funebra ceremonio okazis en lia domo la 14-an de novembro, kiam multaj esperantistoj partoprenis ĝin.

Inter la esperantistoj en diversaj lokoj organiziĝis la Kunveno por konsoli kaj memorigi la spiriton de s-ro Jui. S-ro Jui estis 73-jara ; li laboris multe por esperanto kiel delegito de UEA en Jokohama (antaŭe en Nagoja, kie li loĝis longe) kaj fervore aktivis por MEM.

---

la nuna situacio de la esperanto-movado ; ni tamen konsentas pri la perspektivo, ke la proponata kongresa jaro 1970 ne estos tre taŭga tempo, se ni konsideras la diversajn cirkonstancojn kunrilatajn al la jaro. Pro tio, ni deziras ankoraŭ pli profunde studi la aferon, kontaktante kun la esperantistaj organizaĵoj en la Pacifikaj regionoj, kun espero tamen okazigi la Kongreson en kiel eble plej baldaŭa estonteco.”

Ni aldonas ke ankoraŭ ardas diskuto pri Pacifika Kongreso inter aktivaj esperantistoj en Japanujo ; ni ĝojos aŭdi opiniojn, ĉu por, ĉu kontraŭ, el eksterlando.

*Esperanto-Propaganda Asocio*  
Kameoka, Kioto-hu, Japanujo

# Evangelio de la paco

“Mi kredas al la granda mondo de l’ Paco, kiu, en kaptebla proksimo, estas kapabla ekaperi, tuj kiam ni serioze vokas kaj jesas.” H.G. Wells

*La venonta homo*, kiu troviĝas kiel ĝermo, kiel kapablo en ni ĉiuj, estos spirithomo, kiu tiel suverene disvolvigos la potencon de la spirito, ke li priregos ne nur sian korpon, sed ankaŭ sian vivon vaste kaj evoluigos kapablojn, kiuj ĝis nun nur malofte elstaris kiel antaŭtempa mutacio en individuoj.

La spirito, kiel dia potenco, estas universala en siaj efikoj; kaj tio, kion faras la spirithomo — en kiu la potenco de la spirito progrese vekigigas kaj aktivigigas — sekvos la plej altan universalan principon: *Ni servas al la vivo!*

En la greka mitologio ‘*Eirene*’ — la diino de la Paco — staras kiel supera al la *Marso*, dio de l’ milito. Sur la monumento de Eirene, kreita de Kephisodot en 375 a.K., la pacdiino portas la ‘Pluto’-infanon-alportanton de riĉeco kaj feliĉo por ĉiuj teranoj. Tio fakte estas simbole kaj efektive la donaco de paco al la unuigita homaro: kontento kaj bonstato por ĉiuj.

Nu, la dioj de l’ prauloj en vero estas profundfortoj en la homo, kiuj persistas evolui kiel esprimoj de la diaj volo kaj voĉo en la homa koro. Tiu voĉo de la Eternulo estas hodiaŭ iam aŭdebla por ĉiu, kiu meditas silente kaj aŭskultas internen. Kiam li tutsilente fariĝas kvazaŭ silento mem, aŭdebliĝos al li la admonoj kaj benpromesaj vortoj de l’ Eternulo:

“...Mi donis al vi, miaj infanoj, ĉion plene servantan al via disvolviĝo: la teron, kiu vin portas kaj nutras — la fortojn kaj trezorojn de la naturo, ties abundecon vi iom post iom malkovros kaj al vi servigos — kaj al tio la fortojn de la animo kaj spirito, kiuj kapabligos vin elkreski super ĉiujn terajn kondiĉojn kaj sekvi vian homan destinon.

“Krom la kapableco kaj forto de l’ pensado mi donis al vi la liberan volon, kiu distingas vin de viaj pli junaj gefratoj : de la bestoj, kaj kapabligas vin tutlibere fari la ĝustajon.

“Ĉi tiujn du donojn vi uzis ĝis nun nur nesufiĉe kaj parte false, kaj per tio kaŭzis al vi mem multegan suferon. . . Sed ĝuste tiu ĉi sufero renaskikigos vian penskapablon kaj pensforton kaj helpos vin rekonscii je vi mem, je viaj destino kaj kapabloj, ekkoni, elekti kaj efektiviĝi la ĝuston kaj bonon.

“Vi estas kaj restos por ĉiam infanoj de mia Amo kaj samtempe memkreantoj de via sorto kaj de via estonteco. Vi estas liberaj iri la vojon de memamo kaj detruado kaj tiel malfruktigi la teron, sur kiu vi vivas kaj maturiĝadas — liberaj ŝanĝi la teron en mortejon, sed ankaŭ liberaj decidi por la plibono, efektiviĝi la pacon en vi kaj ĉirkaŭ vi kaj ŝanĝi la teron en paradizon.

“Ne forgesu ĉe ĉio, ke vi estas ne nur infanoj de la tero, sed same ankaŭ de la kosmo, kaj ke, kiam vi estos unuiĝintaj sur la tero, vi staros antaŭ la sekvanta tasko : dum via enpenetro en la universon, pruvi vian parencecon kaj pacan fratecon ankaŭ kun la estaĵaroj de aliaj mondoj, kiuj komence eble ŝajnos al vi fremdaj, sed tamen en si portas la saman spiriton kaj estas same miaj infanoj kiel vi.

“En mia domo estas multaj loĝeblecoj. La universo, pri kiu vi konas nur plej malgrandan parton, ampleksas sennombre multajn vivomondojn kaj -regnojn, kiuj ĉiuj havas la saman taskon kiel vi : almaturiĝi en la sekvo de la eonoj kaj epokoj al la kosmaj konscio kaj potencego, kaj unuece kunagi frate en la servo por spiritigo de la materio kaj de la diigo de ĉiuj estaĵoj en la universo.

“Vi estas liberaj decidiĝi. Vi mem decidas, elektas kaj destinas vian sorton. Estas via tasko vekiĝi je tiu pli granda Realeco, kiu atendas kaj feliĉigos ĉiujn, kiuj aŭdas la voĉon de l’ silento kaj ĝin sekvas.”

(Ĉapitro el “*Manifest des Friedens*” — Manifesto de la Paco — de Rudolf Zimmer kaj K.O. Schmidt, eldonita 1966 de la Deutsche Unity-Gesellschaft, D 532 Bad Godesberg 5, Germanio)

Trad. K. O. Schmidt

## La nuntempa serioza Hispana muziko

Ne estas novaĵo aserti, ke la muzikevoluo dum la lastaj kvindek-sesdek jaroj estis miriga. Tiel miriga, ke en ĉiu lando stariĝis la sama problemo : Kompreni ĝin. La publiko ne povis sekvi la akcelitan ritmon de la serĉado de novaj esprimaj konceptoj, kaj restis malantaŭe. Tiu salto en la tempo estas komparebla nur kun la teĥnika progreso. De post la unuaj provoj veturi tra la spaco ĝis la efektivigo de kosmaj veturiloj, vivadas ankoraŭ unu sama generacio.

La sekvo estis, ke perdiĝis la ebleco surpriziĝi. La nuntempaj homoj legas la informojn pri la sciencaj eksperimentoj ne komprenante ilin, sed akceptante ilin sincere. Tiel same estas al muzikaj verkoj. Ilia ofta nekompreneco ne malhelpas ke oni akceptu ilin neprotestante.

En Hispanujo, la aktualigo apartenas al la lasta generacio de junaj komponistoj. En pasinteco la novaĵoj figuris sur la programoj ne kortuŝante la kreinton. Tio tuta ne mirigas. Nietzsche diris : “Kiam mi supreniras, mi transpaŝas ŝtupojn, kaj la ŝtupoj ne pardonos ĝin al mi”.

Pri la kulturoj ne ekzistas tia ebleco. Tial, aparte de la nova teĥniko kiu naskiĝadis kaj kolektiĝadis en Vieno dum la unuaj dudek jaroj de la jarcento, Hispanujo devis supreniri laŭ siaj paŝoj la ŝtupojn de universaligita naciismo, kies kulmino estis Manuel de Falla (Falja).

Poste, estis Falla mem kiu komencis la novklasikan linion per “La Retablo de Maese Pedro” kaj la “Koncerto por fortepiano”\*. Ernesto Halffter, Joaquín Rodrigo kaj aliaj elĉerpis siajn eblojn. Nova generacio formiĝadis por konsistigi la novan fronton. La kreskanta ekonomia stabileco de Hispanujo kaj la eŭropa politika stabileco helpis ĝian efektivigon. La interŝanĝo de impresoj kaj la interkomunikado de spertoj estis la preludo.

La Festivalo de Darmstadt diskonigas la nomon de Luis de Pablo. Tiu de S.I.M.C. nunjara en Stokholmo, konfirmas la nomon de Enrique Raxach. Inter ambaŭ kaj kun ambaŭ, unu grupo : Ramón

---

\* Temas pri la praforteplanoj, hisp. = Clavicémbalo.



Barce, José María Qudreny, Carmelo Alonso Bernaola kaj Juan Hidalgo. Du komunaj punktoj: ĉiu estas hispana kaj ĉiu apartenas al movado plena je estetika malcerteco moviĝanta jen en la serioza muziko, jen en la spaca, la konkreta aŭ la elektrona.

Mestres Qudreny fondis en Barcelona la “Klubo 49” por diskonigi la nuntempan muzikon. Lia malkvieteco esprimiĝas preter la kreado, en la lukto kiun li konsideras nepra por familiarigi la publikon kun la verkoj de ĝia tempo. Tute same celas en Madrid, Luis de Pablo kiu ankaŭ fondis la grupon “Alea”, same orientitan. Ili ambaŭ centras en la du grandaj hispanaj urboj la nunan aktivecon kaj ili ambaŭ ĉefe prezentadas la novaĵojn kaj hispanajn kaj alilandajn. Kun ili laboras diversaj asocioj alportantaj la nepran monhelpon, kiu sekurigas ilian agadon.

Tiel en sia “Ēpitaĥio” kiel en sia opero “El Ganxo” (La Hoko) Mestres Qudreny reliefigas sian klerecon kaj sian forton en la uzado de rekta lingvo plene originala en sia aparteneco al nuntempaj estetikaj fluoj.

“Módulos I” (Moduloj) aŭ “Ejercicio” (Ekzerco) de Luis de Pablo pravigas en Festivaloj la sukceson de lia esprimo mondo.

Por Carmelo A. Bernaola la koncerta aŭ la okaza muziko por

teatro estas bonegaj esprimiloj. Li preferas, kiel la plimulto, uzi la parolon kaj li faris multe pli ol simplajn eksperimentojn sur la kampo de la hazarda muziko kaj sur tiu de la spaca.

John Cage, la aŭdaca amerika komponisto, estis majstro de Juan Hidalgo. Li ankaŭ estis altirita de la teatro kaj iom post iom trudis sian personecon en kaj ekster la konkreta muziko, superante periodon da influado de sia majstro. Influado malfacile venkebla se oni konsideras la fortan personecon de Cage.

Ramón Barce trovis en la prelegoj ilustritaj per muziko la ilon por interrilatiĝi kun la publiko. Per sia sistemo li helpis komprenigi siajn verkojn kaj tiujn de siaj samtempuloj.

La grupiĝbezono fariĝis neevitebla en multaj landoj. Tial Enrique Raxach, kiu loĝas en Nederlando, aniĝis al grupo “Gaudeamus”. Kvankam li estas la plej juna en ĝi, li jam atingis konsiderindan ŝaton en Eŭropo, laŭ la jam menciita enlaso de unu el liaj verkoj en la proksiman Festivalon de S.I.M.C.

Cristóbal Halffter apartenas al familio de muzika tradicio: liaj onkloj, Ernesto kaj Rodolfo, unu en Hispanujo kaj alia en Meksiko atingis renomon en siatempa muziko. La plej juna familiano iris de ia

## Fraza klareco — Esprima simpleco

Ĉu prelegantoj kaj radiparolantoj sufiĉe atentis la neceson de TUJA kompreno ĉe la aŭdantoj? Ordinare devus esti diferenco inter la skribata kaj la legata, aŭ libere oratorata, lingvaĵo. Iu artikolo povas esti tre efika kiam legata, sed ĉe prelego ĝi devas porti absolutan esprimsimplecon, kiu garantias facilan absorbon dum rapida fluo de la vortoj al la aŭdantoj. En artikolo voĉota, forigu ĉiun nekutiman esprimon kaj uzu esprimon kutiman, klarsencan. Altfugaj, tro “freŝbakitaj” formoj konfuzas aŭdantojn, kiuj tamen eble komprenus ilin en presa materialo.

Do uzu por klubkunvenaj paroladoj kaj radiprelegoj mallongajn frazojn kaj senornaman stilon, t.e. la ofte aŭdatan, “ortodoksan” lingvaĵon. Evitu tenton ekspluati la ekstremajn esprimeblojn de nia mirinda lingvo, rezervante modere tiajn ekzercojn nur por la presita paĝo.

En la nuna etapo de nia afero, tiu konsilo estas nepre sekvinda. Estontece, kiam Esperanto estos jam vaste parolata lingvo, la freŝaj, originalaj, sukplenaĵoj, parte

metaforaj, figurecaj, estos komunaj posedaĵoj, facile rekoneblaj je ekaŭdo por parollingve matura “popolo”. Dume, atendante tiun tempon, ni NE uzu formojn, cetere bonajn en senco literaturo, sed malfacilajn por homoj de malforta memoro uzantaj nur la orelojn.

Verku simple kaj klare! Por la rapideco de la orela kompreno estas absolute necese, ke la stilo de la lingvo estu karakterizata per mallongaj frazoj kaj kutimaj esprimoj, facile komprenebla kaj kies tuton oni tuj komprenas, malgraŭ ebla perdo de unu parto evitinta la aŭdkapablon.

La sukceso de publikaj paroladoj, tiom grava por ni, dependas de la plezuro kaj profito ricevataj de aŭdantoj. Nur kristalklara, simple-elementa verkado tion povas certigi. Ni aparte direktas atenton de radiuloj Esperantaj al tio. Pli simpla stilo en tiu agkampo tre povas favorigi, pli ol nun, nian aferon ĉe la administracioj.

La intervjuo en “Esperanto” (Feb. 1957), je radia dissendo Zagreb, estas ekzemplo de nesaga

metodo fare de alte dotita Esperantisto Ivo Rotkviĉ. Jen ekzemploj de lia stranga manierismo: elkisas tonojn; balgaj krispoj de Esperanto; dispardas; elmeme; kverelsemo; disaraneaĵis; pirozo kaj barelkavaj sonoj; prie; celdisaj; el-enajn leĝojn! Simila misuzo de lia vortjonga talento riĉe troviĝas ankaŭ en lia traduko de “Tragedio en la Universo” kaj en la enkonduko al “33 Rakontoj”: tratuji; trasubiti; pritias; tralaŭas; priapenaŭas; ĉiaĵo k.m.a. Ĉu vere oni tuj komprenus lian dirvolon, aŭdante tiajn malordinarajn parolturnaĵojn?

Kiel bela muziko, ili lulas la spiriton, sed maltrafas la komprenon. Oni ne povas zumi ses sinsekvajn notojn, nek revoki en la memoron unu ideon. Privat, kiel preleganto, meritas zorgan stilstudadon pro lia konstanta uzo de mallongaj frazoj kaj malimplika esprimformo. Tiu karakterizo klare vidiĝas sur la paĝoj de lia verko la “Vivo de Zamenhof”.

### **Influo de nacia lingvo**

Jen alia afero. La plej grava malhelpo kaj minaco al la unueca uzado de Esperanto estas la influo de nacia lingvo sur la individuon. Iuj Esperantistoj, cetere elstaraj, estas tiurilate riproĉindaj. D-ro Vallienne

“uzis francismojn neakcepteblajn” komentis Waringhien en “Esp. Encik.” La traduko de “The Sleeper Awakes” (H.G. Wells) de A. F. Milward estas saturita je Angla-lingvaj idiotismoj kaj influoj pro troa obeo al la originala teksto. Simile pri la originalaj verkoj de Luyken kaj tradukoj de Payson kaj Saville en Usono. Eĉ la Zamenhofologo W. Bailey lasis en sian tradukon de “Petrolo” (Upton Sinclair) multajn frazojn evidente laŭvortajn, sekvinte tro kroĉe al esprimoj en la Angla originalo.

Privat en “Karlo” (p.6) “aĉetas aferojn” anstataŭ “objektojn”, kaj Waringhien en sia Vortaro E-Fr. p.14 dankis amikon pro “sagacaj avizoj” anstataŭ “konsiloj”. For la nacilingva influo!

### **La Eŭropeco de Esperanto**

Aludoj al mitologiaj, religiaj, klasiklingvaj aferoj kaj nomoj el antikva historio. Rossetti riproĉas jene: “Uzi aludojn, kies ŝlosilon posedas ne unu leganto en dekmil, estas impertinentaĵo. Kaj precipe en Esperanto, lingvo de la tuta mondo, necesas, ke ni klarigu ĉiun aludon, kiun ni faras pri nia okcidenta kulturo.”

Jen tikla afero, kiu bezonas diskuton. Principe uzu ilin tre sin-

garde, se vi volas, ke simplaj Azianoj, homoj de meza eduko, komprenu vian verkon. Ekz-e, ĉu ili komprenus “sparta kuraĝo, nerona festeno, herkula tasko, titana tempesto, sadukea, farizea”? Tiaj adjektivoj estas kompreneblaj nur por Eŭropanoj, por Azianoj alte edukitaj en la Okcidenta kulturo, kaj por Azianoj Esperantistoj, kiuj jam de longe sin saturis en la tuta Esperanta literaturo, inkluzive la Biblion.

Ni devas fronti la fakton, ke Esperanto naskiĝis en Eŭropo, kaj ke la grandaj tradukoj de la fruaj jardekoj estis sole nur el Eŭropaj verkoj. En tiuj tradukoj la Eŭropa kulturo, kun ĉiuj terminoj propraj al ĝi, respeguliĝis en Esperantigita formo kaj esprimo. La nomoj de objektoj kaj aferoj estis simple redonitaj laŭ Esperanta ortografio. Simile pri la tradukoj el la Greka, Latina — bazoj de la Eŭropa kulturo. Fidele do al la teksto Zamenhof kaj aliaj uzis, ekzemple, “sizifa” (laŭ Sisyphus) anstataŭ “terure malfacila”, “neplenumbla” aŭ “nefareble malfacila laboro”; simile ankaŭ “herkula tasko”, “titana forto”, “farizea hipokrito” k.t.p.

Notinde estas, ke Japana Esperantisto de nemulta klero povas, per funda studo de Esperantaj verkoj, havi pli da mondkulturo ol la meza Eŭropano, kiu ne legas Esperantan

literaturon.

### **Pli-Orientiĝo de Esperanto?**

Se Esperanto, sub alia nomo kompreneble, havus sian nasklokon en Japanujo, Hindujo, Ĉinujo aŭ Afriko, estas certe, ke oni havus por legi longajn tradukojn el Orientaj, Hinduaj aŭ Islamaj literaturaĵoj, kaj ke la “internacia lingvo” plenplenus per vortoj kaj esprimoj tute fremdaj por Okcidentaj okuloj. Anstataŭ “vikario, rektoro, kolonelo, adjutanto” ekz-e, oni havus ne Eŭropajn radikojn por tiuj vortoj. Jam de longe Orientaj Esperantistoj penetris enŝovi formojn, kiel “bonzo, mulao, getao, hajko”, kaj tiun tendencon certe akcelas la influo de la “Japana Enciklopedieto”.

Laŭ evidenta neceso, historia kaj mondpolitika, teknika kaj ekonomia, Esperanto, pro sia devenloko, devis akcepti la formon de la reganta kulturo, ĉar en 1887 nur la Eŭropa kulturo havis signifon, ĝuste pro la ekonomia, teknika kaj socia potenco de la Okcidentaj nacioj. Sed nun la mondo transformiĝas, kaj tio certe efikos iamaniere ankaŭ sur nian lingvon. Kiam Esperanto tre disvastiĝos inter la Azianoj, oni devas atendi ankoraŭ pli fortajn provojn doni al nia vortaro pli ne-Eŭropan aspekton.

## Julio Baghy, la poeto de l' homeco

La 18-an de marto 1967 post longa malsano mortis en Budapeŝto Julio Baghy, unu el la plej popularaj esperantaj verkistoj, elstara poeto kaj humanisto.

Julio Baghy naskiĝis la 13-an de januaro en 1891 en Szeged, Hungarujo. Liaj gepatroj estis homoj de teatro: la patro — aktoro kaj la patrino sufloristino. Li mem elektis la saman profesion kaj post fino de la aktora lernejo ludis en diversaj teatroj. Dum la unua mondmilito en 1915 li devis soldatiĝi kaj poste pasigis kelkajn jarojn en Siberio en la rusa kaptiteco. Baghy komencis malami la malamon.

Esperantisto li fariĝis en 1911. De tiu tempo li diversflanke partoprenis en la movado: redaktis bonegan "Literaturan Mondon", verkis poemojn, versaĵojn, romanojn, artikolojn, gvidis en multaj landoj Ĉe-kursojn, estis aktoro, reĝisoro, elokventa parolanto, ĉiam bonkora kaj subtila "paĉjo" por multaj geesperantistoj tra la tuta mondo.

Julio Baghy verkis romanojn: "Viktimoj", "Sur Sanga Tero" (daŭrigo), "La Verda Koro", priskri-

bantaj la vivon dum la militkaptiteco kaj dum la unua periodo de la Granda Rusa Revolucio, "Hura" — fantazia kaj satira, novelkolektojn: "Dancu marionetoj", "La teatra korbo", "Verdaj donkiĥotoj", "Koloroj", "Printempo en aŭtuno"; poemarojn: "Pilgrimo", "Migranta plumo", "La vagabondo kantas", "Ĉielarko"; triaktan lirikan komedion: "Songe sub pomarbo". Lia hungarlingva lernolibro de Esperanto aperis en 40.000 ekzempleroj.

En lia abunda verkaro ruĝfadene trapasas la arda amo al homo. "Homo estu homa", "Homo serĉu homecon", "Homeco estas la plej alta idealismo". Jen estas idealoj de Julio Baghy al kiuj li strebis kaj por kiuj li batalis dum sia tuta vivo.

Persone mi konatiĝis kun Baghy precize antaŭ 30 jaroj. Mi diras persone, ĉar, kompreneble, kiel multaj esperantistoj de la intermilita periodo mi tre ŝatis verkojn de Baghy, kies nova libro ne kuŝis longe sur bibliotekaj bretoj. Estis kvindekjara jubileo de Esperanto kaj en Varsovio, Polujo estis okazonta la Jubilea Universala Kongreso de

Esperanto en 1937. Por plivigli la lokan movadon Baghy estis invitita fari kursojn laŭ la senpera kaj amuza metodo de pastro Ĉe. Pedagogia kaj aktora talento de la kursgvidanto allogis multajn kaj la nombro de kursanoj ĉiam kreskis. Ankaŭ aktive li helpis aranĝojn de la Kongreso, helpis aŭ fakte reĝisoris la teatraĵon de la pola komedia verkisto Fredro "Consilium facultatis", kiun plenumis en Esperanto polaj geaktoroj ne konantaj la internacian lingvon. La teatraĵo tre sukcesis.

Sed jen la kortuŝa Vespero de Veteranoj dum la Kongreso, dediĉita al la mortintaj aktivuloj kaj vivantaj veteranoj. Je fono de la mallaŭtaj sonoj de la funebra Chopin-marŝo ekaŭdiĝis la emociplena voĉo de Julio Baghy. Li rememoris Zamenhof, liajn unuajn disĉiplojn kaj jen la melodio pli laŭtiĝis kaj pli forta, pli emocia fariĝis la voĉo de la parolanto, li elmontris eminentan kapablon de oratoro kaj artisto. Kaj movataj de ia interna forto la tuta Kongreso leviĝis por, kun larmoj en okuloj, stare aŭdi la inspirajn vortojn de la esperanta bardo. Chopin kaj Baghy, la romantikulo en la muziko kaj la romantikulo en la esperanta literaturo—kiel bone ili harmoniis...

Eksplodis la dua mondmilito. Amasmurdoj. . . , gettoj. . . , koncentrejoj. . . , sangaj bataloj. . . , humi-

ligoj de homo. . . paligis la noblajn devizojn de Baghy pri homeco! Sed finiĝis la dua mondbuĉado. Ree komencis brili la suno. Ree komencis brili la verda stelo de la spesantistaro, la stelo de l' espero.

Dum unu el la postmilitaj Universalaj Kongresoj de Esperanto ie en la kongresejo subite tempesto surfalis sur min, fortaj ĉirkaŭbrakumoj, kisoj, estis li, kara Baghy. Rea ĝoja intervidiĝo post multaj jaroj de disiĝo kaj suferoj.

Pola esperanta movado post deviga kelkjara stagnado pro la nefavora stalinisma periodo ree vigliĝis kaj okazigis sian vican landan kongreson en Varsovio en 1956. Inter la eksterlandaj gastoj ĉeestis ankaŭ Julio Baghy. Pro eksplodo de la konataj okazintaĵoj en Hungarujo laŭ peto kaj invito de polaj esperantistoj Baghy prokrastis sian revenon kaj tial estis ofta gasto en nia hejmo. Mi rememoras niajn longajn interparolojn pri la politika situacio, pri esperantaj problemoj. Ankaŭ tiam en Varsovio li gvidis tre sukcesintan kurson de Esperanto laŭ la Ĉe-metodo.

Poste kelkfoje ni renkontiĝis en Budapeŝto, traveturante la hungaran ĉefurbon laŭvoje al Jugoslavio kaj Bulgarujo, kiujn mi vizitis laŭ invito de tieaj gesamideanoj.

La lastan fojon mi vidis Baghy

## Ni kondolencas

De Budapeŝto ni ricevis malĝojan informon, ke d-ro Balla Ignác, veterana esperantisto kaj nia reprezentanto en Hungarujo, forpasis en novembro. Ni deziras pacon al lia spirito kaj sincere esprimas nian kondolencon al la familio Balla.

## Redakcia Anonco

— *Volu sciigi al ni*

*vian ĝustan adreson* —

Ni rimarkas, ke en la lastaj jaroj okazas en multaj landoj la ŝanĝo de poŝta sistemo, por rapidigi kaj plibonigi la servojn de poŝtaj-liverado. Laŭ tio ŝanĝiĝas ankaŭ la adresoj de unuopaj domoj pro numerigo de kvartaloj k.s.; ekzemple en Usono oni alprenis t.n. Zip-kodon. Verŝajne estas pro tio, ke al ni lastatempe revenas — foje kun afranko postulata ĉe ni — pluraj ekzempleroj de "Oomoto", maltrafintaj la adresaton. Dum la lastaj tri monatoj la nombro de la resenditaj ekzempleroj atingis pli ol cent.

dum la imponega 51-a Universala Kongreso en Budapeŝto. Kortuŝita pro la varma substreko de sia 75-jara jubileo dum la inaŭguro de la Kongreso li arde kaj emocie paroladis kaj legis sian poemon "Por la Paco", kies fidela batalanto li ĉiam estis!

Ankoraŭ en januaro 1967 mi ricevis lian fotografajon kun novjaraj bondeziroj, skribitaj en hospitalo. . .

Mortis la aminda Julio Baghy, "paĉjo" de multaj esperantistoj. Mortis la vera kaj sincera adepto de Zamenhof, la vivanta simbolo de la esperantismo kaj homaranismo. Mortis la granda, eminenta poeto, sed plue li vivos en siaj rimarkindaj verkoj, kiujn li postlasis al ni!

Ni do urĝe petas al ĉiuj niaj abonantoj-legantoj, kies adreso ŝanĝiĝis kaj kiuj ne ricevis nian revuon "Oomoto" jam de pluraj monatoj: bonvolu tuj sciigi al ni vian nuntempan ĝustan adreson. Sed atentu, koncerne la internacian poŝtservon inter Eŭropo kaj Japanujo, ke la ordinaraj poŝtajoj ĉiam ankoraŭ bezonas proksimume du monatojn, aŭ eĉ pli en malbonaj okazoj.

Renovigu vian abonon por la nova jaro 1968!

**Oomoto**

Abonkotizo : 6.00 ned. gld., 1.70 us. dol. aŭ egalvaloro

## Memore al Julio Baghy

En mezo de floranta, pompa primavero,  
subite falis krude frosta neĝo —  
En mezo de fervora, krea via sfero,  
orfiĝis tron' de l' poezia reĝo.

Ne volas kredi mi, ke plu vi ne revenos,  
sed ŝajnas, ni denove kiel gaston  
korvarme vin en nia rondo re-solenos,  
nek la unuan fojon, nek la lastan.

Jam mankas al ni via voĉo tiom kara,  
kaj mankas via home homa koro,  
fratame arda, nobla kaj sindone rara,  
pulsante ĉiam por la paclaboro.

Demando unu nur sur niaj lipoj ardas :  
Do kial, kial ĝuste vi forpasis ?  
Ni triste unu la alian alrigardas  
kaj sentas ĵus, ke vi nin solaj lasis.

Kaj kvankam morto vin forvokis kaj vi iris,  
semitaj de vi grajnoj ĝermos, verdos.  
Al homaramo vi modele nin inspiris —  
La ĝustan vojon ni jam plu ne perdos.

Facila estu al vi nun patruja tero,  
ripozu dolĉe post longjaraj vagoj !  
Vi, bardo nia, plej genia, plej sincera !  
Ni ĉerpos forton nun de brilaj viaj agoj.



## Sopira Songô

Surflugiloj de la penso  
en la nokto trans la limojn  
flugas mi uzante rimojn  
por agrablo de la menso.

Dum vojaĝo la gvidilo  
certe estas kora sento ;  
ĝi la celon post momento  
trovas ĝoje kun facililo.

Sed demando : kio flugas ?  
Menso, penso, sento nura ?  
La spirit', l' animo pura  
de la korp' facile fuĝas !

La destinon de l' vojaĝo  
koro de la libertino  
fiksas al la amatino ;  
emas amon kun kuraĝo.

Kaj se eĥo jam ekzistas  
la animo sentas tion,  
kreas koran harmonion,  
realigon ne rezistas.

Jam mi flugis, jam mi trovis  
ĝoja estas koro mia,  
estu same koro via !  
Vibras kordon kune movis.

## *Kristnaska dorloto*

“... Almetas poemon de J. Baghy, kiu nenie aperos. Ĝin li verkis en la hospitalo kaj destinis kristnask-donace al sia Muzo, amatino, kies persona nomo hungare estas : “Edit”, kaj kiu konsentis publikigi ĝin nur en la n-ro nov.-dec. de *Oomoto*”. -- el letero de D-ro Balla Ignác.

Etino filigran' en mia vivo,  
kaj laŭdestina plago, didonac'  
samtempe rodo kaj ŝiprompa rifo,  
karesa zorgo, fonto de l' malpac',  
artlerta harpistin' sur ĉiu nervo,  
turmiksulin' de l' fido kun la dub',  
jen obeemo, jen rezista vervo,  
Xantipa nun, tuj poste beba pup',  
alterne jen anĝela, jen diabla  
kun milda cedo, kun ĵaluza spit',  
kaj monaĥino ; “edzinet' ĉetabla”...  
Jen cia bild', amata mia Dit !

Sen fin' kontrastojn povas mi vicigi  
por skizi viva cin en strof' post strof',  
sed mi dorloti volas cin, ne piki,  
ci kara “dibenita katastrof” ...  
Dum du jardekoj senŝancela amo  
nin kroĉas eĉ celperde ĝis la fin',  
negrave do, ke en ĉi farsa dramo  
en mia kor' kiel mi nomas cin,  
ĉu estas sortovole, ĉu enigme,  
nin ĉenis bono kaj malbon' per spit'...  
punktet', ci vivas en mi ja — krisigne...  
mi amis, amas cin, ho, mia Dit !

Kristnasko 1966.

## Vizito de f-ino Sumiko Gotoo en Praha

Jam antaŭ la alveturo de Sumiko Gotoo al Praha mi interkontaktiĝis kun Junulara Sekcio de ĈSEV, kaj samideano Nevan pli juna atendis Sumiko ĉe la Stacidomo de Praha, bonvenigis ŝin kaj kondukis en la Ŝtatan Judan Muzeon, kie mi deĵoris. Tie ni interŝanĝis kaj aranĝis la plej necesajn aferojn kaj netrovinte la eblecon pro miaj labordevoj dediĉi min al ŝi pli multe, ambaŭ foriris en la Junularcentron, kie hazarde ĉeestis iama prezidanto de Praga Esperanto-Klubo s-ro Marik, kiu por ŝi ankaŭ sukcesis prizorgi la loĝejon. Komfortan kaj en vilao-kvartalo. La unuan vesperon Sumiko pasigis kun li. Proksime de ŝia loĝejo loĝas alia esperantistino Milena Ŝkodová, kiu ankaŭ dediĉis sian tempon al nia amikino Sumiko.

Tuj la duan tagon prizorgis Sumiko-n mia tre bona sekretariino de Virina Komisiono de ĈSEK — Anĉi Konopová — kaj vidigis al nia ĉarma knabino el Japanujo Pragan Kastelon, Muzeon de Ĉeĥa Literaturo, Loreta-pilgrimlokon el 17-a jarcento. Pri ĉio Sumiko sentis sin entuziasmiĝinta. Fotografis ŝi tre ofte kaj ni

esperas vidi ŝiajn fotografaĵojn post certa tempo, kiel ŝi promesis.

Duan tagon akompanis ŝin inĝeniero Felix kaj vespere la Junulara Sekcio kun la inĝeniero prizorgis ĉion necesan por prezentado de Sumiko en Praga Esperantista Klubo. Nur tiun ĉi vesperon, vendrede mi la unuan fojon povis veni ankaŭ kaj renkontiĝi por pli longa tempo kun Sumiko.

Kaj la vespero vendrede, tio estis la plej surpriza, ĉarma kaj la plej bela vespero post longa tempo. Sumiko venis en la kunvenejon en sia blanka kimono kaj tuj ĉe ŝia unua paŝo sur la ŝtuparo la ĉeestantoj ekvidinte ŝin aplaŭdis. Tiel bonvenigis ŝin Pragaj esperantistoj atendante ŝin kun senpacienco, ili ĉiuj amase venis. Poste ankaŭ Sumiko tre ĝojis kaj proklamis, ke ŝi sentas sin feliĉa, ke tiom da homoj venis honore al ŝi ĝuste en Praha. Kaj jam ŝi ekparolis per sia neimitebla dolĉa kaj ĉarma voĉo, dancis siajn du japanajn dancojn por ni tiom nekutimajn, tamen interesajn, allogajn, pentris al interesusuloj sur blankan paperon japanajn vortojn, disdonadis OOMOTO-infor-

milojn, devis al multaj subskribi sin en la memorlibretojn, prezentis la filmon pri OOMOTO kaj pri Japanujo, vidigante belegajn diapozitivojn kun sia eksplika komentario. Kiam la tempo progresis, ŝi demandis, ĉu ŝi finu aŭ ĉu ŝi daŭrigu. Ĉiuj unuvoĉe ekkriis: Daŭrigu. . .

La vespero sukcese finiĝis, nia gastino sentis sin kontentigita kaj venontan tagon — sabaton ni aranĝis kunvenon en Esperanto-Biblioteko, por ke ŝi povu enskribiĝi en la memorlibron ankaŭ tie. Posttagmeze, kun inĝeniero Felix ŝi venis tien, tre laca post antaŭtagmezaj aĉetadoj kun li tra Praha, sed la programo ankoraŭ ne finiĝis. Venis ankaŭ Anĉi Bárochová, kasistino de Praga Klubo kaj ni ĉiuj promene iris laŭlonge de la rivero Vltava en la kafejon Slavia, kies fenestroj estas tiom grandaj, ke sidante en la kafejo ni tre bone povas rigardi la riveron. Kaj la unuan fojon mi havis okazon senhaste kaj amikece paroli kun Sumiko, kiu ekde la komenco tuj enskribiĝis en la korojn de ni ĉiuj, neniun nomas ŝin ekde tiu tempo aliel ol Sumiko, aŭ ĉarma knabino. Ĉar ŝi prezentis al ni belegajn diapozitivojn pri sia Sunlando, mi donacis al ŝi diapozitivojn pri Praha, ĉe kio ŝi promesis prezenti ilin en Japanujo. Ŝi ricevis ankaŭ malgrandan pupeton en nacia kostumo, multe da bildkartoj kaj



f-ino Gotoo kaj gesamideanoj antaŭ la Esperanta Biblioteko en Praha

rememoraĵoj, pro kiuj ŝi ĝojis elkore kiel infano. Ŝi havas tiom bonan koron!

Post kelkhora sidado en la kafejo ŝi iris en Nacian Teatron kun Anĉi Konopová, kiun ŝi ekamis kiel sian “avinjon” kaj Anĉi ĝis nun ĉiam nur rememoras sian Sumikon, prikantante ŝian ĉarmecan kaj ne forgesante ŝian entuziasmiĝon pri nia ĉefurbo. Jes, Praha ravis ŝin. Kaj la teatro? Vendita Fianĉino de Bedřich Smetana. Anĉi Konopová sur bildkarto tradukis por ŝi en Esperanton ĉiujn tri aktojn de la komedio.

Dimanĉe mi devis deĵori en la Muzeo kaj Sumiko devis veni kun inĝeniero Felix por ke mi vidigu al ŝi la muzeon. Sed — kio ne okazis, ĉar mi grave malsaniĝis, telefonis tion al ambaŭ, tial ili kune vizitis la muzeon, gvidis ŝin mem la inĝeniero sen mi, sed poste vespere, la telefono de inĝeniero tre ĝojigos min post

# LA EKZISTO DE DIO

Kredi, ke Dio ekzistas. Tiu kreda bazŝtono estas la esence ĉefa elemento de la religio. Ĝin oni ne facile atingas. La koncepto ŝajnas esti ekster kiu ajn kapablo homa. Antaŭ pluraj jarmiloj Jesaja kriis : “Vere Vi estas Dio sin kaŝanta” (45/15). Hodiaŭ

la moderna scienca scio pri la kosmo, la revelacio de la astronomio, la impresaj pretendoj de la psihologio, la kresko de la homocentra humanismo kaj aliaj faktoroj, ĉiam ankoraŭ pli akcelas la deviiĝon for de teismaj kredformoj kaj igas pli malfacila la serĉon al spirita komunio kun la centra ĉiamekzista Potenco, kiu eterne regas kaj direktas la mistere senliman universon kaj la homojn sur ilia kotbuleto — tero.

La argumento plej firma por la ekzisto de Dio verŝajne estas la interna atesto de la animo mem. Malgraŭ la multo da fortoj, kiuj fortiras en la malan direkton, homoj povas havi profundan *senton* pri la



longa suferado en la lito : Sumiko la tutan tagon bedaŭris min, diris, ke ŝi preĝos por mia resaniĝo kaj nepre volis ĉiam viziti min hejme. Ili tamen ne sukcesis realigi sian intencon kaj almenaŭ veninte hejmen Sumiko preparis por mi fajnan eltranĉaĵon el papero, ion ĉarmegan, kaktuŝan kaj la japane skribitan vorton PACO laŭ mia deziro sur granda papero. Tiel ŝi preparis por ĉiu, kun kiu ŝi sabate sidis, ian surprizon. Ĉarma, vere ĉarma bonkorega knabino. Ŝia promeso pri la preĝo por mi kortuŝis min, ke mi preskaŭ ploris. Mi ne resaniĝis tuj, sed post du tagoj mi

povis iri en la Muzeon kaj mi kredas, ke ŝia preĝo elirante el sincera kaj bona koro, havis grandan potencon.

Ankaŭ ŝia forflugo al Helsinki bone sukcesis kaj ni nun ĝojas, ke ni baldaŭ legos ion de ŝi en OOMOTO. En nia nomo, en la nomo de Junulara Sekcio kaj de ni ĉiuj salutu ŝin ankoraŭfoje. Ne forgesu aldoni la saluton mian kun espero, ke ŝi transdonos kelkajn fotojn al redakcio de OOMOTO, kiel ŝi al mi promesis, ni ĉiuj vidus ilin tre ŝate same kiel raporton pri tiu ĉi por ni tre interesa evento en nialanda Esperanto-vivo.

realeco de Dio. Neniam ĝi tute for-  
lasas la koron de l' homo, kvankam  
ĝi povas ankaŭ loki sub la nivelo de  
fakte racia konvinko.

La misteron oni povas fronti  
ankaŭ per la jenaj konsideroj :

*La Kosmologia* : La universo  
fakte ekzistas. Ĉiu komenco devas  
havi kaŭzon. La mondo havis komen-  
con, nome ĝi estas rezultajo. Tial  
sekve ĝi nepre havas kaŭzon. La  
racio do kondukas pensulon retroen  
al la Unua Kaŭzo, la Nekreita  
Kreanto.

*La Teleologia* : La atesto pri ordo  
inteligenta, ĝusteco perfekta — la  
taŭgeco kaj adapteco de ĉiuj elemen-  
toj unu kun la alia. Tion oni obser-  
vas en ĉiu aspekto de la vivo orga-  
nika kaj neorganika.

*La Ontologia* : La ekzisto de  
ideoj pri senlima \*) boneco, vereco,  
justeco, amo. Tiun ekziston oni povas  
klarigi al si nur per kredo, aŭ  
verŝajnega supozindeco, ke ekzistas  
perfekta Estulo al kiu tiuj ideoj  
estas propre atribuendaj, kaj al kiu  
tiuj atributoj apartenas.

*La Argumento Morala* : La ekzis-  
to de la konscienco — la sento pri  
bono kaj malbono — tra la tuta homa  
historio. Neniu homo volonte farus  
sin sia propra akuzanto, juĝanto kaj

turmentanto. Tio estas la argumento  
de Emmanuel Kant.

La desocialigaj influoj de la  
grandaj urbegoj, la depersonigada  
karaktero de la moderna industrio,  
la implico de modernaj sciencaj  
eltrovoj kaj la foriĝado de konvencia  
moralo kun ĝia konsekvenca febliĝo  
de la religia instinkto — ĉio tio  
kombiniĝas por fortigi la senton, ke  
la kosmo, kaj nia mondo, estas nur  
senanima maŝino enigme, sencele kaj  
aŭtomate funkcianta.

Ne tiel pensis la antikvaj pro-  
fetoj kaj mistikuloj tra la jam  
pasinta tempo. Kun penetre funda  
spirita vido, ili deklaris, ke Dio estas  
Persono, kiu vidas, aŭdas, kaj neniam  
dormas. Ili rigardis la plej noblajn  
kvalitojn de l' homoj kiel nur mal-  
forte palajn spegulaĵojn de la Dia  
gloro. Per la epiteto "persona", kiel  
aplikata al Dio, ili komprenis laŭ  
senco : "Ĝu, kiu laŭ perfekteco scias,  
volas, agas kaj amas".

Toleri, kaj simpatie "kompreni"  
la kompatindan historion de nia raso  
kaj ĝian nunan situacion, povas  
sufiĉi nur firma kredo, ke super ĉiu  
fenomeno de nia mondo kaj la tuta  
universo regas justa kaj ama Per-  
sono, kiu per vojoj tre misteraj  
transformas eĉ la plej terurajn ho-  
majn travivaĵojn en rezultojn fine  
bonfarajn kaj en plena akordo kun  
Sia eterna Plano.

---

\* Waringhien en E-Fr. Vortaro donas  
"infinito, -e" en senco filozofia.

## Mia Skribmaŝino

Mia skribmaŝino dum dek jaroj  
akompanis min sur vivovojo.  
Pri miaj literaturaj faroj  
ĝi atestas kun trist' aŭ kun ĝojo.

Sur ĝi tajpis mi jam mil leterojn  
al hom-fratoj en la tuta mondo.  
Ĝi registris versojn kaj pensojn  
elfluantajn el mia cerb-fonto.

Dum mi en medito dronis tute,  
en ekstazo pro l' inspir' poeta,  
mia skribmaŝin' atendis mute,  
al mia elvers' jam servopreta.

Kiam ĝin haltigis la malsano,  
mi al riparado ĝin tuj sendis.  
Kvazaŭ estus ĝi mia infano.  
Ĝian resaniĝon mi atendis.

O ve! Mia skribmaŝino kara!  
Ĝi — portita for, ne plu revenis.  
Larmis mi dum nokta hor' amara.  
Kiom longe tio min ĉagrenis!

Ploras mi pro mia skribmaŝino.  
En forlaso ĝi atendas morton.  
Ekde nun mi jam sen kunulino.  
Havas ambaŭ ni la saman sorton.  
(1966)

## KRUELECO KAJ LA JAPANOJ

Antaŭ nelonge mi vizitis Koreujon kaj havis okazon intime interparoli kun studantoj de la sama scienco kiel mi. Kiam ni menciis pri la sorto de la korea raso dividita en la nordon kaj la sudon, kaj pri la tragedio de la interna milito, ili diris kun malĝoja mieno, “la fakto ke ni estas sampatrujanoj kaŭzas eĉ pli furiozan malamon kaj kruelaĵon kiel okazis en la ribelo de la 25-a de junio, 1950. Se malfeliĉe la sama sorto trafus Japanujon, okazus inter la japanoj tia sama tragedio, kia nuntempe okazas inter la koreoj kaj inter la vietnamanoj. Sed en la pasinta historio de Japanujo, la japanoj ankoraŭ neniam spertis tiel grandan tragedion.

Kiam oni foliumas librojn pri ĉina historio, oni ofte legas, ekz-e, ke oni distranĉis en pecetojn la karnon de malamiko aŭ krimulo kaj

.....  
komenca novklasikismo ĝis la plej progresinta teĥniko por trovi sian vojon. Hodiaŭ li estas senĉese petata de orkestroj kaj Festivaloj en Ameriko kaj Eŭropo.

La serioza hispana muziko estas,

pekulis ilin por manĝo, aŭ ke oni uzis la kranion de malamika generalo kiel pispoton, ktp. Tielajn agojn de venĝemo oni ne povas trovi en la japana historio. Se la malamiko jam pasis en la alian mondon, japanoj ordinare inklinus kun kompato eĉ preĝi pacan ripozon al lia spirito.

Ankaŭ el la eŭropa historio, ni scias, ke oni batalis kelkajn jardekojn pro la religia milito, kio ŝajnus preskaŭ sensenca el la hodiaŭa vidpunkto, malamegante kaj mortigante unuj la aliajn; tia sperto estas io fremda por la japanoj.

Inter la nazioj, kiuj masakris judojn dum la dua mondmilito kaj la mongoloj, nomadoj en Azio, kiuj tutpereigis la urbanojn, junajn kaj maljunajn, virajn kaj virinajn, kiuj rezistis kontraŭ ili, ni ne povas ne trovi ian paralelon de l' ĝisosta ekstermemo.

do, aktuala. Hispanujo estas enkorpiĝinta, kaj la nomoj de ĝiaj komponistoj fame konataj ĉie, klare pruvastion.

Tradukis : Salvador Gumà



La faktoj pri la granda “puri-  
gado” de Stalin en Sovetunio dum la  
1930-aj ankoraŭ estas malkovrotaj  
kaj klarigotaj de historiistoj. Sed laŭ  
noto de iu generalo, kiu rompis  
rilatojn kun Stalin kaj rifuĝis ekster-  
landen, la vero estas, ke la publika  
juĝo por Kamenev, Zinoviev, Buk-  
harin k.a. estis plenumita kun ĉeesto  
de l’ diplomataro en Moskvo kiel  
nura farso sub la sekreta promeso, ke  
Stalin garantios la vivon ne nur al ili,  
sed ankaŭ al la kelkmil kamaradoj  
katenitaj en malliberejoj, se ili  
konfesos kaj atestos laŭ la plano de  
Stalin. Mi havas nenian rimedon por  
konfirmi la verecon de tiu noto. Sed  
kiam mi legis ĝin, mi rememoris la  
rakonton pri la mongola trupo, kiu  
masakris la malamikajn soldatojn,  
kiuj kapitulacis logtrompote de la  
“savo de ilia vivo”, kaj okazigis  
festenon super iliaj kadavroj. Sam-  
tempe mi rememoris la jenan epizo-  
don el la kroniko de Meiji-Reno-  
vigo, epizodo kiu estas tiel kontrasta  
al la antaŭaj.

En la dua jaro de Meiji (1869),  
Takeaki Enomoto, ŝoguna vasalo,  
batalis la lastan batalon kontraŭ la  
registara armeo en Hakodate de  
Hokkaido, la norda insulo de Japa-  
nujo. Sed antaŭ ol komenci tiun  
lastan batalon, li forsendis per ŝipo  
al la ĉeflando ĉiujn vunditajn sol-  
datojn de la (malamika) registara

armeo, kiuj kuŝis en hospitaloj de  
Hakodate, kaj kelkcent kapitulacin-  
tojn el la Daimia Feŭdo Macumae,  
kiuj volis reiri al la ĉeflando. En la  
tempo antaŭ sia malvenko kaj la  
disfalo de sia kastelo, li disdonis  
monon al ĉ. ducent kvindek vunditaj  
soldatoj kaj sendis ilin por bankura-  
cado, kaj ellasis el la kastelo tiujn,  
kiuj deziris kapitulaci, por ke ili  
saviĝu ĉe la registara armeo. Tion  
eksciis la staboficiro Kijotaka Kuroda  
de l’ registara armeo. Ĉi tiu estis  
kortuŝita de lia humaneco kaj sendis  
ĉiarimede persvadi lin pri kapitula-  
co. Enomoto dankis lin pro la afa-  
bleco, sed ne akceptis la admonon.  
Al sia respondletero, li aldonis la  
mane-transskribitan ekzempleron de  
“*Kairicu Zenŝo* (La libro de Interna-  
cia Marjuro)” de Oltoran, kiun li  
ricevis de Prof. Frederix (aŭ Frede-  
ricus?) dum lia studo en Nederlando  
kaj kiun li ĉiam havis apud si. Li  
skribis: “Ĉi tiu libro pri internacia  
marjuro, kiun mi pene studis en  
Nederlando, estas unu sola en Japa-  
nujo. Estos tre domaĝe, se ĝi cind-  
riĝos en la batalo”. Kuroda per letero  
dankis lin pro tio kaj sendis kvin  
barelojn da sakeo al Gorjokaku  
(nomo de la kastelo de Enomoto).  
Post la disfalo de l’ kastelo Kuroda  
estis enkarcerigita. Okazis la minist-  
rara diskuto pri la mortokondamno  
de Enomoto, kiam Kuroda penegis

# Oficiala Komunikajo de la Akademio

Petite de la Germana Esperanto-Asocio (DEB) “solvi la problemon de la pasivaj participoj laŭ Zamenhof”, kaj de la unuanima komitato de UEA “kiel eble plej baldaŭ” difini tiun solvon :

samtempe konsultite de la Unuiĝo Franca por Esperanto (UEF) kaj de la Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj (EUGI) pri la ĝusta senco de kvar tipaj frazoj, kiaj povas troviĝi en diplomatia, komerca, jura aŭ politika dokumento, nome :

1. *Ni garantias, ke la domoj detruitaj dum la milito estos rekonstruataj en 1970.*

== do la garantiantoj estos kvitaj,

A) se en la daŭro de 1970 oni komencos kaj daŭrigos la rekonstruadon ;

savi lian vivon ; li forte insistis, ke oni unue senkapigu lin, se la ministro decidus fortranĉon de la kapo de Enomoto. Finfine Generalo Saigo intervenis kaj liberigis Enomoto en 1872 (laŭ la libro “Takeaki Enomoto” de Giiĉi Kamo.)

Nu, se mi daŭrigos tian komparadon de historiaj okazaĵoj, oni diros “Atendu momenton !” — por interrompi min. Jen kion mi anticipis jam en la komenco. Ĉar kiam mi iam publikigis tian komparon en angla lingvo, miaj kolegoj en Usono kaj Eŭropo reagis kun malaprobo. Certe malkonsentos ankaŭ multaj el la aziaj popoloj, kiuj estis teruritaj de la krueleco de l’ iamaj japanaj armeoj

aŭ ĝendarmoj. La heroo Hidejoŝi, televide dramigita el la Rakonto *Taikoki* estas ŝatata pro lia homeco inter la dommastrinoj en Japanujo. Sed en la najbara lando la koreoj ĉiam ankoraŭ memoras kaj parolas pri lia krueleco montrita okaze de lia Korea Invado, same kiel pri la subpremado kaj barbaraj agoj de japanoj dum la regado de la japana Generalgubernatoro.

Jen kion mi deziras pritrakti ne nur kiel problemon de l’ japana kulturo, sed ankaŭ kiel tiun de l’ homo ĝenerale, kaj por kio mi deziras trovi klarigan respondon.

(daŭrigota)

Trad. Takeo Sakuma (kun P.M.)

- B) nur se en la daŭro de 1970 oni finos la rekonstruadon.
2. *Mi promesas, ke mia ŝuldo estos pagita la 9-an de Majo.*  
 =A) la ŝuldanto senŝuldiĝos la 9-an de Majo ;  
 B) la ŝuldanto senŝuldiĝos plej malfrue la 8-an de Majo.
3. *Ni asertas, ke la aŭtomobilo de sro X estis efektive riparata la lastan semajnon.*  
 =A) la lastan semajnon oni efektive okupiĝis pri la riparado de la aŭto ;  
 B) la lastan semajnon oni efektive finis la riparadon.
4. *Via propono estis unuanime akceptita la 3-an de Junio.*  
 =A) oni akceptis la proponon la 3-an de Junio ;  
 B) oni akceptis la proponon antaŭ la 3-a de Junio.

la Akademio, per 26 voĉoj el 31 voĉdonintoj (kaj 6 kromaj blankaj voĉdoniloj) decidis kaj deklaras, ke en ĉiu el tiuj frazoj nur la senco A estas konforma al la tradicia lingvouzo de Zamenhof, kaj ke ĉia alispeca interpreto estas neoficiala. Tiu decido cetere nur konfirmas kaj kompletigas la rezulton de la voĉdono farita de la Akademio en Julio 1965 pri la senco de la pasivaj participoj en la Fundamento.

Ĉia eblo de dusenceco en la uzo de tiuj participoj estas do forigita per ĉi tiu decido kaj ni esperas, ke la aŭtoroj de lernolibroj de nun konsideros la ĉi-suprajn modelajn frazojn en la senco aprobita de la Akademio.

La 25-an de Novembro 1967,

G. Waringhien, *Prezidanto*

P. Neergaard, }  
 A.D. Atanasov, } *Vicprezidantoj*

R. Bernard, *Sekretario*

D. B. Gregor, *Direktoro de la Gramatika Sekcio*

## Rakonto el maoria lando

Frumatene unu someran tagon okazis ke juristo de nia urbo iris boate sur nia granda lago, Taŭpo, por fiŝkapti trutojn, kaj meze de la tago li albordegis en malgranda golfeto por manĝi kaj iomete ekzerci siajn krurojn. Post kiam li manĝis li esploris la ĉirkaŭaĵon, kaj ektrouvante vojeton, preskaŭ ne distingeblan, inter la arboj, li decidis sekvi ĝin. Supozeble li estis feliĉa, li jam kaptis kelkajn trutojn, li sufiĉe bone manĝis, la suno brilis — certe li estis kontenta. Tamen, sekvante tiun vojeton, iom post iom li estis kaptita de strangaj sentoj de malfeliĉeco kaj timo — eĉ timego, kaj ne sciante kialon, li iris flanken inter la arboj kaj tie haltis, retenante la spiron. Tiam, preterpasanta laŭ tiu vojeto, li vidis aronda indiĝenaj junuloj, vestitaj laŭ la modo de la periodo antaŭ ol alvenis la blankuloj en Nov-Zelando, kaj portantaj la militilojn de tiu periodo.

Silente ili pasis, kaj forpasis ankaŭ la teruraj sentoj, kiuj kaptis la rigardanton. Li daŭrigis sian esploron kaj baldaŭ troviĝis en senarbejo, kie kreskis unu-du nezorgitaj fruktarboj, kaj apude sur la herbejo li vidis falintan, verdigrigintan sonorilon. Li tuj divenis la malgajan historion de tiu loko, kaj vespere, reveninte al la urbo, li enketis inter

konatuloj indiĝenaj. Ili respondis, ke jes, li pravis — en tiu bela golfeto antaŭ proksimume cent jaroj misiistoj starigis siajn domon kaj preĝejon, sed same kiel okazis aliloke dum tiu malfeliĉa periodo de nia historio, militemaj indiĝenoj buĉis la misiistojn kaj bruligis la konstruaĵojn.

Estas konate, ke la Maoriaj homoj de nia lando estas fizike (korpe?) tute sentimaj, sed tiuj homoj diris al la juristo “Ni ne kuraĝus iri al tiu loko”, kaj la juristo, ano de malmolkapa profesio, konsentis pri tio.

*J. White* (Nov-Zelando)

---

### JAPANA MUZIKO SUR SES L.D. DISKOJ

Ĝus aperis ses novaj longe-daŭraj diskoj en la serio de Unesko “Muzik-Antologio de la Oriento”. Ili plifaciligas la studon kaj ĝuadon de japana muziko por aliaj popoloj (precipe okcidentaj), kiuj malmulte ĝin konas kaj ankoraŭ malpli komprenas. Ĉiu disko havas belan kovrilon kun plena enkonduko kaj komentario, fotoj de muzikiloj, ludistoj kaj dancistoj kaj klarigaj muziknotoj. La plimulton de la registraĵoj unue faris la Japana Elsenda Korporacio (NHK), kaj ilia teknika kvalito estas tre alta.

La diskojn eldonis Bärenreiter-Musicaphon (Kassel, Basle, Parizo

# Salono

## de niaj legantoj

★ S-ro Carmel Mallia (Malto) :

Responde al la letero de s-ro Delgado — Granados el Italujo (nenciita : tre malmultaj scias, ke Bienno situas en Italujo) en la marta-aprila numero de Oomoto ĉijare, mi devas unue diri, ke ŝajnas, ke mia artikolserio certe lin ekscitis. Krome ne estas bonmaniere, antaŭ ol publikigi la leteron, sendi ties kopion al mi kun lia hejma adreso nekompleta.

Ek al la enhavo ! Li atentigis pri “malpravaĵoj”, “artikoloj... favoraj al la angla imperiismo”. Tio ne estas ĝusta. En mia artikolserio mi *objektive kaj senpere* menciis nur historiajn faktojn, sen ia komentario. Pri la nomoj de la urboj, mi devas diri, ke la italaj nomoj menciitaj, kun malmultaj ne menciitaj, estas uzataj nur pro ilia historia valoro kaj neniam en la kuranta lingvo arabdevena. Ekzemple : Vittoriosa, Citta Vecchia estas historiaj nomoj donitaj de la Ĉefmajstroj, sed ni ĉiam uzas la nomojn Birgu (por kaj Nov-Jorko) kaj redaktis por la Internacia Konsilo de Muziko la Internacia Instituto por Kompara Muzikologio sub direkto de Alain Daniélou. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

Vittoriosa), Mdina (por Citta Vecchia). Krome, preskaŭ ĉiuj aliaj urbnoj estas tute arabdevenaj : Gzira, Qormi, Hamrun, Gudja, Rabat, Sliema, k.t.p.

Plue. Li estas ĉiam demandanta, kial mi ne kondamnu tion aŭ tion. Ĉu s-ro Delgado ne scias, ke por skribi la historion de popolo aŭ nacio, oni bezonas tutan volumon, eĉ volumojn ? Tie kompreneble mi nur skizis. Pri la aliaj punktoj, kie li menciis lian patrolandon : tio min ne interesas kaj ĝi utilas neniel al plia kompreno de miaj artikoloj. Kaj kion diri pri Komunismo ? Mi tute respektas lian vidpunkton, kvankam mi tute ne konsentas, ke la Komunismo estas la nura solvo (kiel li asertas) al mondpaco. Ĝi estas nur historia okazintaĵo, kaj formortos, kiel la roma Imperio.

Li ruze instigis min verki pri Tajvano. Tion faru li mem, se li deziras, ĉar ĝi ne min interesas.

Ĉiel, mi dankas lin pro la nura laŭda vorto per : “tiom lerta plumo”. Sed li ne forgesu, ke kritiko estas ĉiam dufaceta: riproĉa kaj laŭda. Ĉu estas eble, ke miaj artikoloj inspiris al li nur riproĉon ? Eble ĉar mi ne estas revoluciisto !! Li min ne konas ! Ja la revoluciagojn mi allasas al s-ro Delgado. Mi ne havas tempon por perdi.

Dankon, s-ro Redaktoro, por via pacienco kaj sindono.

\*

★ S-ro Karlo Ĉurda (Ĉeĥoslovakio) :  
Pro feliĉa hazardo nia internacia

lingvo Esperanto ebligis al mi post 56 jaroj malkovri esperantan amikon.

En la monato septembro ĉi-jare mi legis en "Oomoto" N-ro mar.-apr. '67 artikolon de s-ro Joŝimi Umeda pri lia vizito en Kalifornio.

Li skribas inter aliaj aferoj, ke li havis la okazon renkontiĝi kaj interparoli amike kun veteranaj esperantistoj-pioniroj en Usono. Li nomis kelke da samideanoj, inter ili ankaŭ s-ron Parrish. Mi tuj rememoris, ke en la jaro 1911, kiel esperantisto-junulo kaj ano de esp.-klubo en Ĉes. Budějovice (tiam ankoraŭ Aŭstrujo), mi invitis por konatiĝo esperantiston, ankaŭ junan, nomatan Parrish, kiu travojaĝis Eŭropon kaj aranĝis tiam ankaŭ en Ĉes. Budějovice kelke da paroladoj pri Kalifornio.

Post la tralego de tiu ĉi artikolo en la japana gazeto mi volis konfirmi, ĉu tiu s-ro Parrish estas identa kun tiu samideano, kiun mi antaŭ 56 jaroj en Ĉes. Budějovice salutis.

Por ke mi havu certecon en ĉi tiu por mi tre interesa okazaĵo, mi havigis al mi pere de nia esper.-klubo ĝustan adreson de tiu s-ro Parrish kaj mi tuj skribis al li en Kalifornio.

Kia ĝoja surprizo kiam mi post kelkaj tagoj ricevis el Los Angeles, Kalifornio la detalvastan respondon kun sciigo, ke tiu s-ro Parrish estas efektive D.E.Parrish, nun ĉefdelegito de UEA en Usono !

Do, oni povas ĉiam denove diri, ke nia Mondlingvo Esperanto estas

plej praktika lingvo por kunligi la homojn de diversaj nacioj.

\*

S-ro Charles Mann (Usono) :

Ĉi kune estas kopio de mia letero al la usona gazeto, "Fate", kiu estas memklariga. "Fate" okupiĝas pri strangaĵoj, nekonataĵoj, fantomaĵoj, religioj, ekstersensaj perceptoj, k.t.p. Ĝi havas, mi kredas, almenaŭ centmil legantojn. Mi kredas ke vi eble havos intereson en mia letero. Ankaŭ ĝian tradukaĵon mi kunsendas ĉi tie.

Mary Margaret Fuller,  
Redaktoro, "Fate", Illinois, Usono  
Kara Sinjorino Fuller :

Estas kun malvolonteco ke mi malkonsentas kun la eminenta klerulo de religio, D-ro Marcus Bach, sed mi volas montri eraron kaj ankaŭ prezenti alian vidpunkton ol tiu enhavata en lia artikolo pri la Ŝintoa religio en via junia numero. Parolante pri aliaj religioj en Japanujo, li donis priskriban paragrafon pri la "Oomoto" religio.

Unue, la aliĝintoj de ĉi tiu religio literumas ties nomon *Oomoto* ; ĉiu O estas aparta silabo kaj havas la longan sonon ; akcento sur la antaŭlasta silabo, tiel : O-o-mo'-to.

Due, mi havas iom malsimilan impresajon pri la religio ol tiu, kiun mi ricevis el la paragrafo de D-ro

Bach. Kvankam mi elkomprenas ke lia mallonga priskribo estis nur flankaja al la traktado de sia temo, Ŝintoo — kaj mia malsama opinio eble estas pli en vortoj aŭ impresoj ol en faktoj — mi volas diri, sen kontraŭdiri la faktan aserton de D-ro Bach, mian propran malsimilan impresadon en du da paragrafoj.

Kvankam la aserto de D-ro Bach, “Omoto tenas kredon, ‘Spiritoj ofte ne elkomprenas ke ili jam forlasis la korpojn’,” estas vera — mi kredas ke praktike ĉiuj religiaj grupoj, kiuj iam kredis en la ekzisto de senkorpaj spiritoj ankaŭ tenis ĉi tiun korolarion kiel veran. Mi kredas ke nur kie oni ne trovas kredon en spiritoj oni trovas malkredon en la supre citita aserto — kio estas pleje inter materialismaj malnaivuloj el la Okcidento de hodiaŭ. Do, ĉi tiu kredo en neniu maniero distingas Oomoton.

Unu grave distingiĝa eco de ĉi tiu grupo estas ilia priokupiĝo pri la monda frateco, tiel en idealo kiel en praktiko. Ilia gastameco eble estas senrivala — almenaŭ estas ne-superita de iu ajn grupo alia en la mondo. Kvankam ili havas ritaron, eĉ dogmojn, iliaj reprezentantoj en diversaj partoj de la mondo neniam predikas iajn dogmojn aŭ necesajn kredojn. Ilia evangelismo estas limigata pleje al aktiva frateco. Kvankam iliaj temploj kaj ĉiom da iliaj

registroj kaj kronikoj estis detruitaj per la japana imperia registaro, ili nun havas templon en Brazilo krom Japanujo kaj diras ke ili havas ĉirkaŭ milionon da aliĝintoj. Kiel D-ro Bach asertis, ĝi ja vere estas floranta religio.

Kvankam mi jam havis travivan intereson en ĉiuj religioj, mia kontakto kun ĉi tiu religia grupo unue venis ne kiel religio sed per la Internacia Lingvo — Esperanto. La Oomoto-religio havas ĉi tiun moton: “Unu Dio, unu mondo, unu lingvo” (tradukita). Ili elektis la belan, precizan, literaturan, internacian lingvon Esperanto, por sia komunikado.

Kiel verkisto por eldonaĵoj Esperante, krom angle, mi povas aserti ke la literatura gazeto “Oomoto” (unu el la 113 gazetoj en Esperanto tra la mondo) estas unu el la plej bonaj literaturaj gazetoj kiuj venas al mia pupitro.

.....

### **Nova Reprezentanto**

Pro forpaso de d-ro Balla Ignác, ekde la nova jaro la laborojn de la reprezentanto de Oomoto en Hungarujo transprenos s-ino Luisa Brichta (Budapest V, Bathory u. 19). Niaj abonantoj-legantoj en tiu lando estas petataj sin turni al ŝi rilate nian revuon OOMOTO.

## Indekso de OOMOTO 1967

<i>Pri Esperanto kaj movado</i>	
Japana Socialista Partio projektas enkonduki Esperanton en la ĝeneralan edukadon en Japanujo .....	1
Pri mia restado kaj laboro en Japanujo (2) .....	26
Raporteto pri mia vizito en Kalifornio .....	53
Esperanto-Ekspozicio en Bengalo .....	58
Bela esperanta ekspozicio en Nimes .....	59
Pere de Esperanto tra Francio .....	60
Sukcesa 52-a U.K. (Tel Aviv — Rotterdam) .....	97
Dudekjara plano de Esperanto-Movado, 1967 — 1987 .....	98
La 54-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj .....	134
Baudouin de Courtenay .....	142
Ebleco de Pacifika Kongreso Diskutata .....	162
<i>Pri-lingvaj</i>	
Obstakloj kontraŭ Esperanto .....	70
Sperto de Zamenhof .....	102
Oficiala Komunikaĵo de la Akademio .....	186
Fraza klareco — Esprima simpleco .....	170
Holandaj vortoj asimilitaj en la japana .....	117
Japanaj terminoj en Esperanto-English Dictionary .....	134
<i>Prozo, Poezio</i>	
La Rakonto pri Mimi-naŝi-Hōiĉi .....	18
Tankaĵo el Okcidento .....	29
La Kabano de Du Fu .....	80
Inter du gracoj .....	82
Ĝis revido! Sayonara! サヨナラ .....	107
Ambapali .....	154
Memore al Julio Baghy .....	176
Sopira Songe .....	177
Rakonto el maoria lando .....	188
Versaĵoj de Julio Baghy : .....	17, 46, 152, 178
Versaĵoj de Armand Su : .....	156, 183
<i>Raporto, Informo, Diversaĵo</i>	
La nomada vivo .....	4
Spirito de la Israela Socio .....	16
Omaĝe al la animo de Zamenhof ĉe 50-a datoreveno de lia morto .....	33
Kiel Konservi Mondpacon (1) .....	35
Mia vizito al Aŭŝvic .....	42
Spiritismo en Versoj .....	47
Renkontiĝo en Hollywood .....	49
Vivohelpaj vortoj .....	56
Monda Ekspozicio 1970 en Osaka .....	66
La ĥivaroj ne plu estas ĉasistoj de homaj kapoj .....	88
Kie la ŝuo pinĉas .....	105
La insulo Tajvano : historia skizo .....	110
Paco .....	130
Nekredebla renkontiĝo en Japanujo .....	144
La libera infano .....	147
Al la legantaro de Oomoto .....	150
Evangelio de la Paco .....	166
La nuntempa serioza hispana muziko ..	168
Krueleco kaj la japanoj .....	184
Julio Baghy, la poeto de l' homeco .....	173
La ekzisto de Dio .....	181
La "Esploro de l' Vivĝojo" de H. Deguĉi ..	6
Raporto pri Fakkunsido de Oomoto kaj nia vojaĝo .....	9
Mia vojaĝo en Eŭropo .....	12, 73
S-ano Kinsuke Ito farigis urbassembleano .....	15
Nekrologo .....	29
S-ro J. Umeda revenis el Havajo .....	31
Forpasis Julio Baghy .....	40
Du reprezentantoj de Oomoto-junularo al la 52-a U.K. .....	41
Valoro de Urbo-ĝemeligo per Esperanto ..	57
Pluraj internaciaj eminentuloj publikigis rezolucion favoran al la mondcivitaneco .....	68
Mia feriado en Bulgarujo .....	78
Ŝanĝo de la vojaĝprogramoj de niaj gejunuloj .....	94
Azio malsatas — ankaŭ je libroj .....	94
Instruistoj bezonataj en Afriko .....	95
Aliĝu al la Secubun-festo de Oomoto per alsendo de hitogatoj .....	142
Du junaj reprezentantoj de Oomoto revenis .....	149
Japana esp-isto s-ro Jui sin brulmortigis por admoni la ĉefministron .....	164
Ni kondolencas .....	175
Vizito de f-ino Sumiko Gotoo en Praha ..	179
Japana muziko sur ses l.d. diskoj .....	188
De niaj legantoj .....	30, 64, 125, 189
Anoncoj : .....	31, 45, 52, 93, 96, 160, 175
Reklamoj : .....	32, 64, 95, 128, 136, 139